# LA INFORMILO

Bulteno de la Orient-franca Federacio aliĝinta al la Unuiĝo Franca por ESPERANTO

Prezidanto : M.Cuéné 59, rue des Trois-châteaux 68 - COLMAR
Sekretario : J.P. Colnot 15, rue de Lavaux 54 - LAXOU
Kasisto : J. Chapellier 109, Avenue de la Malgrange 54 - JARVILLE
CCP. : 399.75 Nancy
Junulara Respondeculo : R.Kubler 20, rue du Ruisseau RODERN 68 - THANN

No 61 Julio 1969

## VORTOJ DE LA PREZIDANTO

Tiuj vortoj estu nur ĝoj- kaj esperplenaj.

Ĝojplenaj, jes, ĉar mi povas malavare esprimi miajn plej sincerajn Gratulojn al niaj strasburgaj geamikoj pro la, en ĉiuj punktoj, sendifekte sukcesa organizado de la unua franco-germana kongreso. Neniu el ili riproĉos al mi se mi tute speciale direktas tiujn gratulojn al sinjoro KNECHT kiu, senlace, dum pluraj monatoj, laboris por prepari tiun neforgeseblan renkontiĝon. Tro malproksime de Strasburgo, mi ne vidis tiun laboron per propraj okuloj (mi povis nur konstati la mirindan rezulton) sed el ĉiuj flankoj oni admirplene raportis al mi pri ĝi. Akceptu do, kara amiko KNECHT, nian elkoran dankon.

Tamen, li ne estis sola. Grandan subtenon li ricevis, ne nur de la strasburganoj, kiujn mi ne volas citi pro timo forgesi iun, sed ankaŭ de niaj oberkirch'aj amikoj kiuj, havinte jam la sperton pri organizo de nacia kongreso, bonege konsilis kaj helpis lin. Sinjoroj POPPECK kaj HEISS kaj iliaj grupanoj estu do ankaŭ tutkore gratulitaj kaj dankitaj.

Esperplenaj, tiuj vortoj ? Jes, ĉar mi havas la profundan konvinkon ke ĉiu partoprenInto al tiu kongreso returnis al sia hejmo kun la certeco ke nia afero nur povas kreski. Ĝi ĉiam trovas kaj trovos homojn sufiĉe sindonemajn por pruvi ke Esperanto ne estas utopia idealaĵo sed konkreteco oferante al la homaro plenan komprenon, vortan kaj animan.

Vivu do niaj strasburgaj gesamideanoj kaj vivu Esperanto !

Marcel Cuéné

ESPERANTO-EKZAMENOJ - Sukcesis la unuagradan Esperanto-ekzamenon dum la nuna lernjaro : en Strasbourg , s-ino JUNG Anne-Marie, s-ino STAHLBERGER Madeleine ges-roj STEINMETZ Robert kaj Lucienne, s-ino VARGAS, fr-ino MUTSCHLER Marie-Louise, fr-ino BRAUN Irène, ĉiuj el Strasbourg - S-ro NORTH el Châtillon, fr-ino LOURENCO el Bolsenheim, s-ro RIMBOLD Gérard el Dangolsheim. En Nancy Fr-ino CAVEDINI Monique ( post 5-semajna lernado).

Gratulojn al ĉiuj sukcesintoj kaj bondezirojn por plena profito de nia lingvo kaj plua studado al superaj ekzamenoj.

KOTIZOJ 1969 - Atentu bone !

Se kruceto troviĝas en la apuda kadreto, tio signifas ke la kasisto de la Federacio, S-ro CHAPELLIER Jean (adreso supre) ne ankoraŭ ricevis vian kotizon 1969. Li estus al vi dankema se vi bonvolus sendi al li senprokraste tiun kotizon elektitan en la aldonita tabelo. Tutkore li antaŭdankas vin.

Raporto pri la 28a Kongreso dela Orientfranca Esperanto-Federacio kiu okazis en COLMAR la 9an de marto.

Nia kongreso okazis pli frue ol kutime pro la laùdata konkurenco de la francgermana kongreso en Strasbourg dum Pasko. Belega vetero favoris nin sed bedaùrinde ĉeestis nur 35 personoj (el kiuj 24 membroj), kaj neniu eksterlandano. Venis gesamideanoj el Colmar, Strasbourg, Epinal, Creutzwald, Buhl, Vieux-Thann, Mulhouse, Golbey, Bischheim, Jarville, Laxou, Wittenheim, kaj (ekster federacio) Parizo kaj Gray.

Nur je la deka komenciĝas la debatoj en la akra lumo de la televidaj lampegoj ĉar je nia alveno jam atendis nin teamo de raportistoj de la regiona televido en Strasbourg. Ni bedaùris ne esti pli multnombraj, sed ŝajne la raportistoj tiris la plej bonan rezulton el nia ne tre granda ĉeestantaro. Laùdire, la filmo kiu aperis ĉe la televido (nur la ĵaudon 13an de marto) estis bona propagando, kun intervjuoj de Sroj Bourdeaux (ĝenerala sekretario de UFE), kaj Zipfel (Strasbourg).

Post malfermo de la laborkunveno, fare de Sro Cuené, oni legas salutleterojn el Sro Giloteaux kaj Fino Faulier.

Post legado de la aktiveca kaj kasa raportoj kaj ilia aprobo, raportas diversaj aktivuloj pri sia urbo : en Mulhouse (Sro Lienhardt), kunveno okazas ĉiusemajne en SVP-Jeunes (kiu estas urba aranĝo). En Strasbourg (Sro Knecht) : ĉiuj membroj partoprenas nun la organizon de la Federacia Kongreso. Okazis lumbildparoladoj pri Florivalo kaj pri libertempoj de Sino Oehri. La kurso kiu okazis en Rektorato ĉesiĝis post majo-junio pasintaj. Sro Zipfel gvidis ĉi-vintre kurson kun 30 gelernantoj, 10 el ili sukcesis la unuagradan ekzamenon. La grupo havas nun pli ol 40 membroj. En la regiono de Thann (Sro Grossmann) oni kalkulas 3 lernantojn en Vieux-Thann, 3 en Bitchwiller, kaj Sro Kubler gvidas 6 en Roderen. En Guebwiller, okazis tiom da aferoj ke Sro Wermelinger konsilas relegi pri tio la antaùajn Informilojn ! Krom reklamo en montrofenestro, kiu nun daùras, oni zorgas ĉefe pri ekspozicio de infandesegnaĵoj interŝanĝe kun Rusoj el Siberio. Estas antaùvidata kreado de "ĝardeno de Esperanto" en Guebwiller.
En Nancy, (Sro Colnot), efektiviĝas ĉefe koresponda laboro. Ĉiuj provoj interesi la publikon al parolaj kursoj fiaskas unu post la alia. Krom 1 parola lernantino, ni varbis 20 korespondajn lernantojn, kiuj ŝajnas ĝenerale bone labori. Ni informis per cirkuleroj kaj afiŝoj 250 Junuldomojn kaj 50 kamparajn hejmojn.

En Bar-le-Duc, laù letero el Sro Denis, okazas en la Kolegio de ĝenerala Instruado, modela Esperanto-kurso. En Januaro, la nombro de lernantoj kreskis ĉiusemajne ĝis fine, kun kvindeko da lernantoj , neniu klasĉambro troviĝis sufiĉe vasta ! La lernantoj jam korespondas, unuope kaj kolektive. Neesperantistaj lernantoj dela Kolegio krome ricevis pere de la Esperanto-klubo, adresojn por korespondi en la germana aù angla lingvoj.

Por plibonigi la financojn de la Federacio, oni proponas diversajn rimedojn : Sro Habermehl : monkolekton. Sro Knecht : de nun oni starigu kongreskotizon por nia Federacia Kongreso. Sro Wermelinger : oni petu ĉiujare, krom kotizon, aĉeton de almenaù 1 esperanto-libro.

Post tiu unua parto de la debatoj, kiu daùris 45 minutojn, oni akceptas unuanime la proponon pri adapto de la statutoj, pura formalaĵo.

Por relekto de triono de la komitato, rekandidatiĝas Fino Jacquot kaj Sro Chapellier. Novaj kandidatoj estas Sino Hervé (Wittenheim) kaj Sro Grossmann (Vieux-Thann). Ĉiuj estas unuanime elektitaj.

=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=

INFORMO POR NIAJ MEMBROJ.- Por certigi la aperon de "LA INFORMILO" antaù la ferioj, ni limigis ĝian amplekson je 4 paĝoj kaj prokrastis la aperon de diversaj informoj pri la grupoj.

Ni esperas ricevi el ĉiuj membroj sufiĉe da informoj por eldoni la proksiman Informilon dum oktobro !

ĜOJAJN FERIOJN AL VI ĈIUJ !

Ni studas poste la naciajn problemojn. Post kelkaj klarigoj de Sro Bourdeaux, ni aprobas unuanime la agadan kaj financan raportojn. Koncerne la elektojn de 8 kandidatoj al la nacia konsilio : Sro Wermelinger reprenas sian kandidatiĝon ; estas do 8 kandidatoj por 8 postenoj kaj ni voĉdonas unuanime por ĉiuj. Nia delegito en Strasbourg estos Sro Cuené.

Sro Knecht petas helpon de pliaj bonvolemuloj por la Komuna Kongreso en Strasbourg. Oni bezonos ilin por multaj servoj, i.a. ĉe 2 akceptejoj : en la stacidomo kaj ĉe la Rejna ponto, ankaŭ por vendado de libroj kaj trinkaĵoj en la Kongresejo.

La debatoj finiĝas je la 12a kaj ni piede promenas al la urbodomo, kie afable akceptos nin Sro Schreiber, vicurbestro. Je nia alveno en la urbodomo, eksplodas gaja fifra koncerto ; ni unue imagas ke la urbestraro aranĝis tion por nia akcepto Sed, tute ne, temas pri svisa orkestro, kiun ĵus akceptis la urbestro !

Post la komuna tagmanĝo, ni kunvenas denove por labori kun Sro Bourdeaux, kiu klarigas al ni la rolon de la Federacioj. UFE ne estas la Pariza Centro, UFE konsistas el ĉiuj Federacioj. La Federacioj estas UFE, ili devas sendepende labori, gvidi kaj kontroli la laboron de ĉiuj 'siaj grupoj kaj UFE nur sendas instigojn, centraligas la raportojn, kaj disponigas komunajn servojn.

Longaj diskutoj malebligas viziton al la urbo. Sub gvidado de Sro Lienhardt ni lernas kanton laŭ interesa maniero.

Komitata kunveno, kiu kunigas 10 komitatanojn el 12, renovigas la estraron:

Prezidnto : Sro Marcel Cuené (Colmar) - Vicprezidanto (Junularaj aferoj) : Sro Roland Kubler (Roderen). Sekretario : Sro Jean-Paul Colnot (Laxou). Helpsekretariino : Fino Anna JACQUOT (Epinal). Kasisto : Sro Jean Chapellier (Jarville). Membroj : Sroj Pol Denis (Bar-le-Duc) - Robert Durand (Epinal), André GROSSMANN (Vieux- Thann)- Sino Claude Hervé (Wittenheim), Sroj Fernand Knecht (Strasbourg), Jacques Manceau (Creutzwald), Eugène Wermelinger (Buhl).

La proksima Federacia Kongreso okazos principe en Epinal.

J.P. Colnot.

---

## Renkontiĝoj kaj ekskursoj

De post nia federacia kongreso, kiel vivas nia Federacio ? Ni finis la jaron 68an kun 123 membroj, kaj ni tiel fariĝis la 3a Federacio en Francujo laŭ membronombro. Nun por 1969 ni atingis preskaŭ la saman nombron, varbado de 25 novaj membroj, ĉefe en Strasbourg, kompensis diversajn malaperojn.

Dum Pasko, okazis en Strasbourg la unua Komuna Francgermana Kongreso kaj kvankam ni ne sukcesis trovi kuraĝulon por verki raporton pri ĝi, ni scias dank'al kelkaj linioj de nia Prezidanto kaj al artikoloj en aliaj gazetoj, ke ĝi bone sukcesis.

Dum, kaj tuj post tiu dulanda kongreso, okazis en la Junulargastejo de Kehl francgermana Junulara renkontiĝo, kaj vi legos pri ĝi, ĉi-poste, raporton.

En Aprilo, ni sendis al ĉirkaŭ 60 personoj (aktivuloj kaj interesiĝantoj), programon de projektitaj renkontiĝoj kaj ekskursoj por 1969. Bedaŭrinde pluraj ekskursoj ne okazis aŭ misokazis pro malbela vetero. La 4an de majo, nur 4 nancianoj piede grimpis al "Tête du Coquin" super la Plaine-valo, apud Donon, sed revenis sub pluvego! La 11an de majo, 5 nancianoj denove ekskursis al Croix-Bodin kaj Rambiroche, ankaŭ super la "Plaine"-valo. Tiam ili ĝuis belegan veteron, sed bedaŭrinde neniu povis veni el aliaj urboj, ĉar okazis en Lyon renkontiĝo de JEFO. Kompense, la 18an de majo nur Thannanoj veturis al La Bresse : la vetero estis tiam bela en Alzaco, sed en Vogezoj kaj Loreno jam pluvis, tial neniu alia venis ! Poste, dum Pentekosto, ni kunvenis (25-30 ope) en la Soci-kultura Centro de Mittelwihr, apud Colmar (raporton ĉi-sube). Ni planas por la 22a de junio (aŭ se malbela vetero, por la 29a) piedan ekskurson de Ottrott al Sainte-Odile ; kaj eventuale ni povus rendevui en La Bresse la 6an de julio por tiu ekskurso, kiu ĝis nun ne povis okazi.... Sed la bulteno aperos verŝajne nur post tiuj promenadoj.

...

Aliajn aranĝojn oni nur skizis ĝis nun : partopreno al la vinfestoj en Neustadt (Germanujo) kaj Guebwiller (Francujo), kaj eble aliajn.
Ni povas nur rekomendi al la samideanoj, kiuj deziras nepre ricevi detalajn informojn pri renkontiĝoj kaj ekskursoj, ke ili anoncu sian intereson ĉu al Sro Kubler, ĉu al Sro Colnot (vidu adresojn ĉe la kappaĝo).

J.P. Colnot.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

Internacia Junulara Renkontiĝo de JEFO kaj GEJ en Kehl

De la 4a ĝis la 12a de aprilo, 50 gejunuloj el 11 nacioj renkontiĝis en Kehl, ĉe la germana landlimo. La urbestro afable akceptis landajn delegaciojn en la urbodomo.

La propra programo de IJR komenciĝis nur post komuna parto-prenado al la franca-germana Kongreso en Strasbourg. Je la ĉefa demando : "Kion deziras la nuna junularo ?", ni klopodis respondi per surstrata intervjuo farita en Kehl kaj Strasbourg, kaj konstatis kun miro iom grandan diferencon inter la du koncernataj ŝtatoj !

Prelegoj, promenadoj, kunsidoj kar distraĵoj varie sin sekvis. Interesis nin prelego de Hans Bakker pri la junularo kaj paroladoj de S-ro Gilotceaux pri ĵurnalisma fako.

La Eŭropan Domon en Strasbourg ni ankaŭ vizitis, kaj la interpretistino ricevis multege da demandoj, precipe el eksterlandaj ĉeestantoj. Post la vizito ŝi konfesis, ke ĝis nun neniam oni petis de ŝi tiel multnombrajn klarigojn !

Ankaŭ ni faris propagandon pri Esperanto en la regiono de Kehl. Vespere ni gastigis interesulojn ; eĉ kelkaj jam lernis la unuajn lecionojn, inter ili juna blondulino dekjara. Ŝajnas, ke ili tre ŝatis la esperantan etoson, ĉar antaŭ ol foriri ili volonte eniris nian rondon kaj gaje popoldancis... ĝis la formo de la junulargastejo !

Pri tiu finfine sukcesa kaj tre sura renkontiĝo oni povas nur konstati la malgrandan partoprenadon de la francaj gejunuloj tiam, kiam alvenis granda nombro da Germanoj, iuj tre krokodilemaj, bedaurinde...

Ariane DURAND (Epinal).

-=-=-=-=-=-=-=-=-=-

Junulara Renkontiĝo dum Pentekosto en Mittelwihr

Jam 3an fojon ĵus okazis regiona franc-germana renkontiĝo.Post la sukcesaj renkontiĝoj pasintjaraj en la Eŭropa Domo de Strasbourg (31 mar. 68) kaj en la junulara domo de St-Martin (30-aug.-2 sept.68) nun la Esperanto-Grupo de Thann (kunlabore kun Or;Franca-E-Federacio) siavice invitis la ambaŭlandajn gejunulojn al 3-taga pentekosta renkontiĝo (24-26 majo) en la ĉarma kaj agrabla "Sociala Kultura Centro" de Mittelwihr, apud la alsaca vinstrato iom norde de Colmar (68).

La celo de tiu renkontiĝo estis konigi Alsacon kaj la regionon de Colmar kaj plidaŭrigi la amikecajn rilatojn ligitajn kun la germanaj geamikoj.

Bedaŭrinde la German-Franca Junulara Fondaĵo (OFAJ/DFJW) kiu pasintjare konsiderinde subvenciis la renkontiĝon en St-Martin, ĉi-foje rifuzis doni subvenciojn pro la magraj rimedoj en la nunjara budĝeto de la Fondaĵo. Tiel, la organizinto, nia amiko André Grossmann, devis iom modifi la programon kaj redukti la daŭron de la restado. Sed malgraŭ tiuj malfacilaĵoj li tamen sukcesis kombini plaĉan programon, kiu allogis dudekon da germanaj kaj francaj gejunuloj. Diversaj diapozitivaj prelegoj trovis la atenton de la ĉeestintoj : Enkonduke Manfred Kitthaler montris belajn lumbildojn pri la malnova kaj la hodiaŭa Strasburgo. André Grossmann prezentis bildojn pri la norvega ĉefurbo Oslo kaj Hans-Dieter Platz prelegis pri Turku (urbo de la nunjara postkongreso) pri finna saŭno kaj laglando. Dimanĉe posttagmeze ni faris piedan ekskurson al la 3 kasteloj St-Ulrich, Gersberg kaj Ribeaupierre. Interesa kaj alloga estis senkosta vingustumado, al kiu invitis nin vinkulturisto Sro Siegler el Mittelwihr lundon matene. Dancvespero kun alia franc-germana grupo el Lyon kaj Frankfurt, vesperaj promenadoj tra la pitoreska vilaĝo Riquewihr, kaj aŭto-veturado al Ribeauvillé estis pliaj interesaj programpunktoj. Nepre ankoraŭ menciendas, ke la manĝoj en la kultura Centro de Mittelwihr estis ne nur tre bonaj, sed ankaŭ tre variaj kaj riĉenhavaj. Por la germanoj speciale la alsaca "choucroute" estis tre alloga manĝo

La germanoj verŝajne aranĝos dum septembro-oktobro denovan renkontiĝon okaze de tiea vinfesto. Detala programo sekvos. Krome la ambaŭlandaj gejunuloj planas aktivan partoprenon en la vinfesto de Guebwiller. - Hans-Dieter Platz -